Kio protektas Nordan Amerikon antaŭ dronigado?

La eŭropaj Alpoj estis formitaj ekskluzive pro la kunpuŝiĝo de kontinentaj platoj; iliaj radikoj etendiĝas en la grundon duoble profundaj ol tiuj de aliaj pejzaĝoj. Kaj ĝia interno estas malvarma.

Laŭ plej novaj geologiaj ekzamenoj, en Norda Ameriko tio estas tute alie. Tie la varmec-variado en la profundo egalas al la suprakaj-malsupra-strukturo de la surfaco: ju pli varmega la krusto, des pli alta la pejzaĝo. Tridek kilometroj sub la 1500 m alta Kolorada Plataĵo regas varmo de 650 gradoj da Celsio, sub la "Grandaj Altebenaĵoj" (*Great Planes*) nur ĉirkaŭ 500°C.

La varmega ŝtonaĵo en la profundo ŝveligas la nordamerikan kontinenton kvazaŭ kiel kukopaston kun gisto. Sen tiu ĉi varmego la tuta kontinento jam delonge estus sinkinta en la maron. Se la temperaturo de la tiea terkrusto malaltiĝus laŭ la plej malvarma temperaturo sub la aliaj kontinentoj, tiam la urbo Ĉikago kuŝus preskaŭ 700 m sub la marnivelo, Lasvegaso eĉ 1300 m.

Vivu la varma gistopasto! (Fonto: *Brockhaus*-kalendaro, 2009-09-28)

Ĉu Ameriko kaj Eŭropo malproksimiĝas unu al la alia?

Politike ni ignoru tiun ĉi demandon; por tio estas ofte decida la koncerna politika formo laŭtagorda. Sed geologie oni pli facile trovas fidindan respondon.

La "mezoceana dorso" estas kvazaŭ grandega konstruejo de nia Tero, el kiu seninterrompe fontas lafo. 60 000 km longa kaj ĝis 3 km alta ĝi serpentumas super la grundo de la oceanoj. Dekstre kaj maldekstre driftas apartige la terplatoj. Sed la lafo ne eliĝas laŭlonge de la dorsoverto de la montaroj, sed pli vere el dekstra- kaj maldekstraflankaj "kamentuboj". Krom la puŝegado kaŭzita de la daŭra laferupcioj ankaŭ kurigas subtere flosantaj rokaĵotorentoj la platojn – en Atlantiko laŭ nordokcidenta direkto. Tio kaŭzas, ke Ameriko kaj Eŭropo malproksimiĝas unu for de la alia – unu fingrolarĝecon en tempodaŭro de unu jaro.

Se hodiaŭ Kristoforo Kolumbo denove devus krozi Atlantikon, li devus veli pliajn 12 kilometrojn ol antaŭ 500 jaroj.

(Fonto: *Brockhaus*-Kalendaro 2009-12-12/13)

La unua Eŝvegano estis neandertala homo

Por la unua fojo konfirmiĝis, ke en la Norda Heslando de Germanujo vivis homoj jam antaŭ ĉ. 40 000 da jaroj. "Tranĉspuroj kaj batsignoj je la pelvaj ostoj de lanharrinocero, kies restaĵoj antaŭ 10 jaroj estis elfositaj en gipsminejo en Oberhono (*Oberhone*), urboparto de Eŝvego (*Eschwege**), indikas prilaboron per homaj manoj", diras la heslanda ĉefpaleontologo d-ro *Thomas Keller*, kiu nomas tiun ĉi malkovron "malgranda sensacio". Li save protektis la ostojn, post atentigo de la "Eŝvega Akciosocieto pri Antaŭa kaj Praa Historio" en la jaro 2000, sed nur en la pasinta jaro purigis kaj ekzamenis ilin.

Homosapiensa setlado kvinmil jaroj pli poste

D-ro *Keller* estas certa, ke la ostoj estas prilaboritaj de neandertalaj homoj, ne de *Homo sapiens*. "La hodiaŭa homo enpenetris la regionon norde de Alpoj nur antaŭ 35 000 da jaroj", klarigas la sciencisto. "Sed la ostoj estas almenaŭ 40 000 jaraĝaj, eble pli. La precizan aĝon rezultigos plua ekzameno".

La 50 cm longa osto montras plurajn linearajn tranĉspurojn kaj enhavas V-forman noĉon, kiu eble originas de batego, eble per fajroŝtono. Restas tamen enigme, ĉu la neandertaluloj mem ĉasis kaj

* Eŝvego = *Eschwege an der Werra*, Germanujo. Longitudo 10,0667 / E 10°4'0'', Latitudo 51,1833 / N 51°11'0''

mortigis la lanharrinoceron, aŭ ĉu ili eble manĝis la viandon de alikaŭze mortinta besto. Ĉar, laŭ *Keller*, la neandertalaj homoj ja estis tre lertaj ĉasistoj, sed antaŭ agresema lanharrinocero ili certe havis profundan respekton. La osto nun restas en la Departamento por Palentologio de la Landa Ministerio pri Monument-Protektado en la heslanda ĉefurbo *Wiesbaden*. D-ro *Keller* tamen informas, ke li ankoraŭ en tiuĉijara januaro venos al Eŝvego kun la pratempa postlasaĵo. Ĝis aŭtuno li volas raporti pri la temo per scienca publikigaĵo.

Pliaj indikoj de homa prilaboro

Post la malkovro de la lanharrinoceraj ostoj en *Oberhone*, kiuj surbaze de ĝiaj prilaborspuroj indikas setladon de la eŝvega regiono per neandertalaj homoj antaŭ 40 000 jaroj, la urba arĥivisto d-ro *Karl Kollmann* de la Urba Muzeo hazarde trafis sur pluaj indikoj. Ĉar ankaŭ la de li tie ekde jaroj ekspoziciitaj ostoj de lanharrinocero trovitaj en Eŝvega urboparto, montras entrančaĵojn, kiuj permesas konjekti, ke ili estas prilaboritaj de homaj manoj. Ĉu tio estas vera, tion intencas ekzameni la landa paleontologo d-ro *Thomas Keller*.

La ostoj falis al forgeso

Ankaŭ sur la ostoj de glaci-epoka lanharrinocero, kiu – krom aliaj fosilioj – estis malkovrita jam antaŭ 100 jaroj en *Eschwege-Oberhone*, estis videblaj ennoĉigaĵoj. Tiuj ĉi spuroj (14 estas ekkoneblaj) estas kompareblaj kun la entrančspuroj, kiujn observis antaŭnelonge la landa paleontologo en *Wiesbaden* sur antaŭ 10 jaroj (same ĉe Oberhono) trovitaj rinocera pelva osto, kaj ankoraŭ estas neklaraj. Dum la plej recenta malvarmeg-epoko, kiu finiĝis antaŭ ĉirkaŭ dek mil jaroj, ekzistis en la oberhona regiono iuspeca "flua tero" kun kelkaj terfaloj, kiuj estiĝis pro malŝarĝiĝo en la karstregiono. Multaj bestoj eble suferis akcidenton, estis retenataj de la tera supo kaj, movblokataj, marĉiĝe dronis. Tiuspecaj kuŝejoj ĉe Oberhono estas konataj. Post paso de jardekoj tamen multo falis al forgeso. Jam en la jaro 1910 la "Eŝvega ĉiutaga periodaĵo" ("*Eschweger Tageblatt*") raportis pri ostotrovaĵoj. Kelkaj el la tiam malkovritaj kruraj ostoj de lanharrinoceroj estis dokumentataj en 2004 de la Arĥeologia Akciosocieto. Ili nun kuŝas en la Eŝvega urba muzeo. (Fonto: *Werra-Rundschau*, 2010-01-07/08, p.1, p.3)

☼

Scienca Revuo Vol. 61 (2010) (1) / n-ro 220

Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)
Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.
Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj
Laserkopiita: Januaro/februaro/marto 2010 ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30 DE - 37269 Eschwege*/Germanio
Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj

Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare
pagebla pere de via
a) landa peranto (resp. landa delegito)
aŭ rekte al
b) ISAE-konto ĉe UEA/*Rotterdam* (NL): isae-z *) *vd. sube*
aŭ per
c) IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF
t. e. por ISAE-anoj el Germanujo: vi pagu (anstataŭ kiel pli frue al ISAE/Sachs) al la germana poŝtĉeka konto de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en *Köln*, Germanio, kun indiko "ISAE-jarkotizo (...jaro...) por UEA-konto isae-z"

Landaj Perantoj de ISAE

Aŭstralio	*Libroservo AEA*	*<liboservo@esperanto.org.au>*
	143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.	
Brazilo	*Brazila Esperanto-Ligo (BEL)*	*<bel@esperanto.org.br>*
	C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília	
Britio	*S-rino Viv O'Dunne*	*<eab@esperanto-gb.org>*
	p.a. Esperanto Asocio de Britio (EAB)	
	Station Rd., Barlaston	
	Stoke-on-Trent, Staffordshire, ST12 9DE Britio	
Finnlando	*S-ino Päivi Saarinen*	*<paivi.saarinen@iki.fi>*
	Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo	
Francio	*S-ro J.Charles Trébouet*	*<trebouet.bohere@club-internet.fr>*
	Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil	
Irlando	*S-ino Joy Davies*	*<noviresp@eircom.net>*
	9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W	
Korea Resp.	*S-ro Cho Sung Ho*	*<shcho@inha.ac.kr>*
	Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751	
Norvegio	*Eldonejo Esperanto*	*<hara-ryg@online.no>*
	Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo	
Pollando	*S-ino Magdalena Tatara*	*<mtatara@gmail.com>*
	Košmice Wilkie 323, PL32-020 Wieliczka	
Svedio	*S-ino Lisbeth Andréasson*	*<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>*
	Kajsa Kavats gata 8, SE - 24235 Hörby	
Usono	*Esperanto-USA*	*<eusa@esperanto-usa.org>*
	1335 Stanford Ave, Suite 300, Emeryville CA 94608, USA	

*) **Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b) (kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendata Scienca Revuo) la eldonanton:**
Prof. Dr. R. Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio
Tel. xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>